Pretigi la vojon al la estonteco

de Andreas Emmerich

Jubileo ĉiam estas okazo por pripensi, pripensi, kiel la tempo forflugis kaj kion nia movado atingis. Unue ni devas konfesi, ke nia granda revo pri la tiel nomata „fina venko“, la publika enkonduko aŭ eĉ nur akcepto de Esperanto ĝis nun ne realiĝis.

Sed atentu jenan rezonadon:

Bonvolu pripensi, ĉu iam en la historio iu nova, granda kaj bela ideo venkis glate kaj senobstakle. Ĉu ne ĉiam tia ideo elvokis des pli multe da rezisto, ju pli bona ĝi estis? Ĉu ne ideo, kiu progresigus la homaron ne nur en materia, sed ankaŭ en morala vidpunkto, preskaŭ ĉiam estis rifuzita per tiuj, kiuj insistis pri siaj pozicioj pro egoismaj motivoj aŭ pro sia malkapablo?

Tiuj estis la vortoj de nia estimata samideano, sinjoro profesoro doktoro Wilhelm Dietterle, kiujn li uzis dum sia prelego en la jaro 1920, cetere en Braunschweig. La titolo de tiu prelego estis "Apologio de Esperanto kontraŭ ĝiaj kritikantoj", kaj laŭ mi sinjoro Dietterle faris nur unu eraron. Kial ni pravigu Esperanton kontraŭ la kritikantoj? Kial ne ili devus pravigi sin?

Esperanto estas oferto al la homaro. Ne ni volas ion de la aliaj, sed inverse: Ni havas donacon al la mondo. Se la mondo estas tro stulta por akcepti ĝin, estu tiel. Sed la historio montras, ke ĉiuj bonaj ideoj venkas – eĉ se tio bezonas jarcentojn.

Kelkaj el vi jam estas lacaj. Ni atendas la finan venkon jam dum multaj jardekoj. Antaŭ nelonge tre kara samideano starigis en nia revuo *Esperanto aktuell* la demandon "Ĉu Esperanto estas ĉe sia fino?" Jen ŝoka demando. Certe, multaj el vi dediĉis sian tuton vivon al Esperanto. Nun eble vi intertempe estas maljunaj, kaj vi timas, ke vi ne plu vidos la finan venkon kaj ke ĉiuj viaj esperoj estis vanaj.

Sed, karaj samideanoj, vere Esperanto estas ĉe la komenco de sia kariero. Kaj Esperanto neniam plu malaperos el la mondo. Eĉ se ni ĉiuj malaperos, Esperanto restos. Konsideru niajn atingojn: Esperanto el nura projekto fariĝis vivanta lingvo kaj disvolvis kulturon. Tio estas unika evoluo en la historio de la homaro. Kaj tion ĝi atingis malgraŭ ĉiuj obstakloj. Esperanto kaj la esperantistoj suferis malakcepton, subpremon kaj persekutadon. Same kiel multaj grandaj ideoj. Prenu kiel ekzemplon la kristanismon. Kaj kiel longe daŭris, ĝis ĝi estis vaste akceptata? Certe pli ol cent jarojn, multe pli. Kaj eĉ la metra sistemo, kies utilo estas tute ne kontestata, ĝis nun ne atingis sian „finan venkon“. Kial do rezigni pri Esperanto? Ni havas ĉian kaŭzon por esti memfidaj.

Andreas Emmerich, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio.

Cetere mi opinias, ke eĉ hodiaŭ ni suferas formon de subpremo. En nia epoko ni ne plu bezonas timi, ke krima ŝtato malpermesas la movadon kaj ĵetas nin en malliberejon. Almenaŭ. Tamen: Flanke de politikistoj kaj de certaj ĵurnalistoj oni ridindigas nin, malatentas nin, aŭ sisteme prisilentas nin. Esperantistoj devas konsili al siaj denaskuloj prisilenti sian konon de Esperanto, se ili kandidatas por profesia posteno. Mi konas ekzemplon, ke la skriba noto „Esperantisto“ en akto de dungito baris ties karieron, kaj al Esperanto-amiko de mi diris iam profesoro de medicino, ke Esperantisteco estas formo de cerba malsano.

Ĉu tio ĉio ne ankaŭ estas formo de subpremo? Kaj ĉu ni ne tamen progresas?

Kio estas direnda pri politikistoj, tion mi jam diris antaŭ du jaroj, mi ne ripetos tion nun. Mi volas nur substreki, ke ni ne esperu pri subteno de tiu flanko – kun kelkaj esceptoj, kiel la urbestro de Herzberg, kiu estas saĝa homo kaj tre laŭdinde helpas al nia movado. Sed ankaŭ lia helpo venas reage al la laboro de la loka grupo. Se ni havus tiajn grupojn kiel en Herzberg en ĉiu urbo, la fina venko ne plu estus malproksima.

Certe, ankaŭ mi demandas min, kion mi atingis. Mi havas la honoron esti prezidanto de GEA nun jam kvin jarojn. Kion vi esperis, elektante min? Ĉu mi kontentigis viajn esperojn? Ĉu miajn proprajn? Tiujn kompreneble ne. Sed almenaŭ ni progresis iomete! Senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras.

Tial mi estas tutcerta, ke la Germana Esperanto-Kongreso okazos ankaŭ en la jaro 2106. Neniu el nia rondo partoprenos ĝin, kompreneble; sed niaj posteuloj rememoros nin, same kiel ni nun rememoras niajn estimatajn antaŭulojn, kaj ili rigardos nin admire kiel la pionirojn, kiuj pretigis la vojon al la estonteco.

Prelego de Andreas Emmerich, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, okaze de la 83a Germana Esperanto-Kongreso en Brunsviko, 2a - 5a de junio 2006